INVITO AL PARTOPRENO EN LA PROJEKTO SES (nun 7) MILIARDOJ DA HOMOJ

Pere de interaktiva retejo vi mem povos partopreni kreante vian propran konton kaj poŝti vian atestadon aŭ fariĝi tradukanto aŭ debatgvidanto. La tradukistoj ne estu profesiaj tradukistoj kaj ili rajtas traduki en la lingvon de ilia elekto la interfacon de la retejo tute aŭ parte.

Se la homaro ne sukcesos kunvivi ne eblos plu krei daŭrigeblan evoluon. Kvankam en la nuna epoko ni dronas en amaso da informoj, unuopaj civitanoj de iu ajn deveno dise tra la mondo tro malofte rekte renkontiĝas kaj aŭskultas unu la alian. Ĝuste ĉar en Malio kie la iniciatinto ne povis foriri pro paneo de la helikoptero, li kaptis la okazon paroladi tutan tagon kun loka vilaĝulo en maniero tute malferma de homo al homo pri pri liaj timoj, liaj sonĝoj, liaj provoj, liaj esperoj... Sekvas sube la informoj por kunlaborado diversmaniere kaj en diversaj lingvoj, ĉar sur la retejo de goodplanet.org mem estas malfacile trovi kaj konsulti la detalojn. En Esperanto eĉ ne unu intervjuon mi trovis.

Kontakto : 6milliardsdautres@goodplanet.org, en la franca al :
claire@yannarthusbertrand.org
Jen la kompleta demandaro :

1. Prezentu vin mem, via profesio,…
2. Kiu estas via tutunua memoro ?
3. Kiu estis viaj sonĝoj dum infaneco ?
4. Kion vi lernis de viaj gepatroj ?
5. Kion signifas familio por vi ?
6. Kion vi volas transdoni al viaj infanoj ?
7. Kion vi opinias malfacila por rakonti al viaj infanoj aŭ familianoj ?
8. Kio donis al vi la plej grandan feliĉon ?
9. Ĉu vi estas feliĉa?
10. Kion signifas feliĉo por vi ?
11. Kio forte ridigis vin lasttempe ?
12. Kiam vi ĉagreniĝis aŭ ploris la plej lastan fojon ? Kial ?
13. Kio estas nuntempe via plej granda sonĝo ?
14. Kion vi oferis kaj ne plu volas lukti por ĝi ? Kion vi volas ŝanĝi al via vivo ?
15. Kiun plej grandan obstaklon vi supervenkis ? Kion vi lernis el tio ?
16. Kiu estas via plej granda timo ?
17. Ĉu vi havas malamikojn ? Kial ?
18. Kio furiozigas vin kaj kial ?
19. Kio signifas amon por vi ? Ĉu vi trovas ke vi donas kaj ricevas sufiĉe da amon ?
20. Pro kiu kialo vi povus murdigi alian personon ?
21. Por kiu kialo vi volus fordoni vian vivon ?
22. Ĉu vi facile pardonas ?
23. Kion vi neniam povus pardoni ?
24. Ĉu vi sentas vin libera?
25. Kion vi ne povus malhavi en via taga vivo ?
26. Ĉu vi amas vian landon ? Ĉu vi jam prikonsideris forlasi vian landon kaj kial ?
27. Kio signifas ‘esti hejme’ por vi ? Kaj kio estas ‘foriri’ ?
28. Kion signifas la naturo por vi ?
29. Ĉu vi vidis ŝanĝi la klimaton ekde via infanaĵo ? Ĉu vi klopodas protekti la naturon ?
30. Ĉu vi vi havas pli bonan vivon ol viaj gepatroj ? Kial ?
31. Kion signifas mono por vi ? Kial ?
32. Kion signifas progreso por vi kaj kion vi atendas de ĝi ?
33. Kio estas la plej granda malamiko de la homoj ?
34. Kaj kio estas la plej granda amiko de la homoj ?
35. Ĉu vi kredas en Dio ? Kion signifas Dio por vi ?
36. Ĉu vi scias preĝon. Ĉu vi povas reciti ĝin ?
37. Kio estas la senso de via vivo ?
38. Kiu estas via plej ŝatata kanzono. Ĉu vi povas kanti ĝin ?
39. Ĉu vi jam estis viktimo de diskriminacio?
40. Kion vi volas diri aŭ demandi al la homoj kiuj legos viajn respondojn ?